

Leterkesto III

Radioprelego de Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI, SRI 1990-003-A-3, 1990.01.25

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI. Hodiaŭ vi aŭdas la trian parton de nia leterkesta serio. Temas pri korespondaĵoj, kiujn nia esperanto-fako ricevis dum la jaro 1989.

A.- En Ĉeĥoslovakio ni havas multajn radio-amikojn. Ankaŭ tie oni opinias, ke niaj elsendoj povus daŭri iom pli longe. Estus dezirinde iom redukti la sekvantan popolmuzikon favore al novaĵoj pri Svislando kaj teknikaj anoncoj pri la esperanto-programo.

Vere estas bedaŭrinde, ke oni ne povas veturi al Svislando, skribas ĉeĥa emerito, kvankam la distanco estas la sama kiel al la orienta parto de Ĉeĥoslovakio. Eble ankaŭ tio malaperos, esperas nia aŭskultanto.

Cl.- Vere, ni ricevis ankaŭ konfirmojn, ke la ŝanĝita elsendohoro por la eŭropa programo estas por kelkaj eĉ pli taŭga ol la malnova tempo. Sed estas evidente, ke la plimulto plendis pro la dumposttagmeza horo. Malkontenta pri tio estas ankaŭ sinjoro Patera el Prago: "Mi devas konstati, ke la poreŭropaj dissendoj ricevas ĉiam pli malfavoran elsendotempon kaj mi timas, ke ili estos disaŭdigitaj iam inter la 2-a kaj 4-a horo matene, kiam plejmulto da homoj dormas. Sed tio estas certa malsukceso ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de la romanĉaj dissendoj." Sed, "la programoj mem estas multflankaj kaj ĉiam aŭskultindaj", emfazas la ĉeĥa samideano. Elsendoj en formo de intervjuoj al fakaj esperantistoj estas ĝenerale tre ŝatataj. Sinjoro Patera skribis ĉirilate: "Mi memoras ekzemple la intervjuojn kun iuj eksterlandaj esperantistoj, ekzemple pri Grabowski kun la pola esperantisto Chmielik, aŭ kun Reto Rossetti, kiun aŭskulti estas ĉiam eksterordinara ĝuo. Ankaŭ la paroladoj de d-ro Baur estas bonegaj, mi memoras ekezemple tiun pri la elektroaŭtomobiloj aŭ la lingvan temon pri svisoj." Kaj rilate la staton de esperanto en Ĉeĥoslovakio, sinjoro Patera povas nin pozitive informi: "Nia entuziasmo daŭras plu" skribas sinjoro Patera menciante, ke la pozicio de esperanto en Ĉeĥoslovakio plifirmiĝas kaj oni povas esperi, ke la Universala Kongreso en la jaro 1992 okazos en Prago, ĝuste dum la jubilea jaro de Komenio.

Ankaŭ apud Prago oni kaptas niajn elsendojn, kiujn oni surbendigas pro la bona elparolo. La bendo estos poste prezentita en la loka klubo.

A.- El Slovakio atingis nin preskaŭ flata letero de aŭskultanto, kiu tutcerte ŝatus ekscii pli multe pri la vivo en Svislando. Li skribis: "Ni Slovakoj scias, ke en Svislando vivas en paco kaj riĉeco kvar gentoj, kiuj delonge gardas sian liberecon kaj sendependecon. Nia lando estas ankaŭ negranda, sed suferanta pro malbona ekonomia stato. Oni provas reformi la ekonomion, sed ĝis nun ni vidas neniajn fruktojn. La gvidado estas nefaka, sed influata de diversaj celoj..." Responde al la demando de la slovaka samideano, ĉu ni akceptus kelkajn liniojn pri la esperanto-movado en Slovakio, ni povas nur jes tiom kaj atendas la informojn.

Cl.- Kaj fine ni ŝatus esprimi nian sinceran dankon al ĉiuj aŭskultantoj el Ĉeĥoslovakio, kiuj sendis al nia redakcio gratulkartojn okaze de festotagoj.

A.- Ankaŭ en Finnlando oni aŭdas esperanton el Svislando, kvankam finnaj leteroj malmultas. Komencanta 22-jara fina esperantisto, kiu studas la rusan kaj anglan lingvojn, dezirus, ke Svisa Radio Internacia povu aranĝi ĉiutagan elsendon en esperanto. Nome en Finnlando niaj elsendoj estas tre bone aŭdeblaj, klaraj kaj sufiĉe interesaj.

Cl.- Francio estas tre ofte reprezentata inter la aŭskultantoj de niaj disaŭdigoj. El tiu lando skribis al ni lastatempe sinjoro Jean Amouroux el Perpignan. Ankaŭ li bedaŭras la malkonvenan ŝanĝon de la elsendohoro. Rene Borain el Saumur kaj Jean Calamy el Gemenos surbendigas niajn prelegojn kaj sinjorino Robert Gaussen el St-Mamert aĉetis taŭgan radioaparaton por certe kapti niajn elsendojn. Pro la kartsalutoj ni dankas ankaŭ al Jean THIERRY kaj Eric BENECH en Parizo, André AUDE en Saint-Avertin, André BLE en Lille, Ruget CAMILLE en Cogners, Jacques DONY en La Ricamarie, Juliano DUCROCQ en Calais, Laurent GAUTIER en Autun, Leon LEGROS en Lambersart, Claire MARTELLI en Gilette, Laurent VIGNAUD en Les Ponts-de-Lé, Kulturdomo en Grésillon, Jean-Yves HANRION en Metz, Radio Toulouse, kaj Lionel VENON en Selles sur cher.

A.- Kiel anoncote en la nova prospekto de SRI, la plej oftaj korespondaĵoj venis en la jaro 1988 el Federacia Respubliko Germanio. Atendebla estas simila rezulto por la jaro 1989. La plej diligentaj raportantoj daŭre nomiĝas Norbert MERKENS el Wuppertal kaj doktoro Ludwig RÖLL el Günzburg. Iliaj indikoj estas tre utilaj, ĉar ili pritaksas la teknikan kaj kvalitan karakterojn de la elsendoj.

Doktoro Werner BORMANN el Hamburgo, reagante al la diskutoj pri la landnomoj, skribis: "Mi samopiniis kun vi, ke nek eblas, nek utilus ŝanĝi enradikiĝintajn landnomojn. Niakaze anstataŭ 'Federacia' en FRG estus pli bone uzi 'federa' - sed tio estas pura teorio: ni ŝtatanoj de FRG dum 40 jaroj uzas la pli pezan formon. Nova por mi estis via malrekomendo de 'Svisujo'.

Sinjoro Georg KRIEGMAIR en Erding demandis, ĉu prelegoj ankaŭ estas aĉeteblaj per kasedoj? Responde al tio eblas anonci, ke organiziĝas lusero de tiaj kasedoj, kaj estas tute antaŭvideble oferti la aĉeton de la koncernaj kasedoj kun prelegoj de nia radio.

Pluraj germanoj restos sur niaj ondoj, inter ili Karl-Heinz KERSTING el Essen, Anny HARTWIG el Nürnberg, doktoro Josef KONDOR el Neuwied, Michael KOOB el Dernbach, Stefan KRISCHER el Karlsruhe, Anton KRONSHAGE el Schwelm, Lothar MAHN el Rottweil, doktoro Rokure MAKABE, Esperanto-Grupo Nürnberg, Marcus SIKOSEK en Gladbeck, Hans Georg STRAUSS el Leverkusen, Peter THÖNNES, Wenzel WEBER el Mönchengladbach, Hugo WESTERHOFF el Waltrop kaj Johann WINDISCH el Singen.

Cl.- Ni havas ankoraŭ multajn aliajn interesajn korespondaĵojn, kiujn ni prezentos al vi kadre de la sabata poreŭropa elsendo ekde la 3-a de februaro.

Vi aŭdis Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI, kiuj diras al vi ĝis reaŭdo.